

Januaro 2014

**ESPERANTO-KURSOJ OFICIALE ORGANIZATAJ**  
**EN UNIVERSITATOJ KAJ ALTINSTITUTOJ**



kompilinto : **Germain PIRLOT**  
Steenbakkersstraat 21  
BE-8400 Oostende, Eŭropa Unio  
[gepir.apro<at>pandora.be](mailto:gepir.apro@pandora.be)  
07.01.2014

**Antaŭparolo :**

*Karaj legantoj,*

*Jen mia deksesaj kompilado kiun, bedaŭrinde, ni ne diskonigu al ne-E-medioj !*

*Kial? Ĉar, kiel iu ajn povas konstati, la oficiala instruado de Esperanto en universitatoj kaj altinstitutoj daŭre falas ... En 1986 mi sukcesis arigi sciigojn pri 125 kursoj en 28 landoj. Nun ili estas nur 40 en 16 landoj, sen mencii 14 neoficialajn kadre de universitata asocio aŭ en universitatoj de la tria aĝo.*

*Fakte tute fiaskis mia celo, kiam mi komencis tian kompiladon : uzi tiajn informojn por prepari dosieron dum kontaktoj kun lernejoj, kaj por interrilatigi universitatajn E-studentojn i.a. kaj precipe por fakaj celoj.*

*Neprus repripensi nian argumentadon pri la utileco de Esperanto, ne plu per argumentoj de 1887, sed de 2014 ... Same endus repripensi la celadon de la lingvo, ne plu nur por havigi novajn membrojn al la "verdaj kluboj", sed por ankaŭ estigi fakrilatojn trans la lingv-limojn. Ne malofte, mi havas la impreson, ke Esperanto restas klub-amuzilo ! Pro tio ni bedaŭru ke pluraj fakaj E-asocioj estas nur surpaperaĵoj.*

*Por plibonigi kompiladon de E-kursoj en la lernejoj, endus ke ĉiu landa ILEI-sekciestro faru tion en sia propra lando kaj ke, je fiksita limdato, la rezultoj estu senditaj al responsulo de ILEI, kiu diskonigu la mondan situacion i.a. pere de "Edukado.net".*

*Korege mi dankas ĉiujn gekolegojn, kiuj afable havigis al mi sciigojn por mia kompilado, kiu, bedaŭrinde, jaron post jaro daŭre malgrasiĝas ... Endus nutri ĝin... Ne per vanaj vortoj, sed per konkretaj agoj !*

Germain Pirlot



**Enhavo :**

Oficiale en universitatoj kaj altinstitutoj . . . . .	p. 3
Disvolviĝo 1977-2014 / grafikaĵo . . . . .	p. 14
Ne-oficiale organizataj kursoj . . . . .	p. 15
AIS / San Marino . . . . .	p. 18
Esperanto-Universitato . . . . .	p. 19

**Klarigoj de mallongigoj :**

(\*) : informis la kursgvidanto mem

(°) : informis alia persono

- **a)** univ. aŭ sup.inst. + adreso, nacilingve laŭ latina alfabeto

- **b)** kursgvid. + privata adreso, poŝta kaj reta - /P/ la kursgvid. estas pagata

- **c)** mallonga priskribo - h/sem : horoj/semajne - s. : sume.

kun ekzameno, studunuoj, atestilo.

**!!! ret<at>adreso : <at> anstataŭigas @**

\*\*\*\*\*

**Nombro** laŭlande : Aŭstrio : 1 - Brazilo : 3 - Bulgario : 1 - Ĉekio : 1 - Ĉinio : 13 - Francio : 1 - Germanio : 2 - Hispanio : 1 - Hungario : 1 - Italio : 1 - Japanio : 3 - Korea Resp. : 4 - Kroatio : 1 - Litovio : 1 - Meksiko : 2 - Nederlando : 1 - Nikaragvo : 1 - Pollando : 1 - Usono : 1

=> **sume : 40**

**Landoj : 16**

## Aŭstrio

### **Innsbruck (\*) :**

**a)** Universitato, Lingvistika Instituto ĉe la Fakultato de la Mensaj Sciencoj / Leopold-Franzens-Universität Innsbruck, (Innrain 52, AT-6020 Innsbruck).

**b)** Mag. Bernhard TUIDER (teamestro de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko) [bernhard.tuider<at>onb.ac.at](mailto:bernhard.tuider@onb.ac.at) (kontaktadreso: [sprachwissenschaft<at>uibk.ac.at](mailto:sprachwissenschaft@uibk.ac.at); retejo: <http://sprawi.uibk.ac.at/>).

**c)** Interfakultata (kurso por la studentoj de ĉiuj fakultatoj kaj studoj, parto de la studplano por la studo de Interlingvistiko: "Esperanto-Kurso kaj enkonduko al la interlingvistiko". Proseminario troviĝanta en la studplano por lingvistoj kaj ĝenerale elektebla lekciaro por aliaj studentoj.

Nomata "Blockseminar", blokseminario, la kurso okazas dum semestro je du semajnfinoj (sabate kaj dimanĉe, 09:00-16:00). La daŭro konformas al 2 universitataj horoj/semajno. Kun ekzameno kaj atestilo.

## Brazilo

### **Campinas (São Paulo) (\*) :**

**a)** Ŝtata Universitato de Campinas (Campinas-SP-BR).

**b)** Prof. Jozefo LUNAZZI (UNICAMP / Instituto de Física, Rua Sergio Buarque de Holanda, 777, Cidade Universitária "Zeferino Vaz" –Campinas – SP BR-13083-859 – [lunazzi<at>ifi.unicamp.br](mailto:lunazzi@ifi.unicamp.br) ) - S-ro Luis Guilherme JARDIM - S-ro Rafael Henrique ZERBETTO ([rzerbetto<at>gmail.com](mailto:rzerbetto@gmail.com) ).

**c)** Nedevisa ; 2 h/sem, s. 30 h. Por studentoj el ĉiuj Fakultatoj; sed iu ajn persono povas ankaŭ partopreni.

Kun poento por la studentoj, proporcia al la kvanto da horoj/semajne.

Kun du ekzamenoj kaj diplomo de la loka Kultura Centro de Esperanto.

### **Curitiba (Paraná) (\*) :**

**a)** Federacia Universitato de Paranao (UFPR).

**b)** Prof. D-ro Ivan Eidt COLLING ( [iecolling<at>yahoo.com.br](mailto:iecolling@yahoo.com.br) ) - S-ro Jônathas BARROS ( [lotusfloro<at>hotmail.com](mailto:lotusfloro@hotmail.com) ).

**c)** Temas pri kursoj en CELIN (Centro pri Lingvoj kaj Interkulturo - [www.celin.ufpr.br](http://www.celin.ufpr.br) ), kiu estas programo de por-komunuma agado de la UFPR ("por-komunuma" signifas, ke ĝi celas ne nur la internan universitatan publikon (studentojn, docentojn, oficistojn), sed ankaŭ la eksteran, ĉar ĝi ne apartenas al programo de iu specifa universitata kurso.

Tiuj kursoj estas 30 horaj. En 2014 okazos "Esperanto 1" (S-ro J. BARROS) kaj "Esperanto 7" (Prof. I. COLLING).

### **São Paulo (São Paulo) (\*) :**

**a)** Universitato de São Paulo / Universidade de São Paulo - USP.

**b)** Prof. D-rino Rosane de Sá AMADO ([ro.amado<at>gmail.com](mailto:ro.amado@gmail.com)) - S-rino Karina Gonçalves de Souza de OLIVEIRA ([kgsoliveira<at>gmail.com](mailto:kgsoliveira@gmail.com))

c) Temas pri kurso en Centro de Lingvoj de la Fakultato pri Filologio, Filozofio kaj Homaj Sciencoj (<http://clinguas.fflch.usp.br/cursos/1306>). La kurso estas kontraŭpaga, kaj eblas partopreni en ĝi kaj gelernantoj de la universitatoj kaj iu ajn de la cetera publiko. En 2014 okazos "Esperanto I" kaj "Esperanto III"; 4 h/semajne.

## Bulgario

### **Karlovo (\*) :**

a) Internacia Universitato (BG-4300 Karlovo, p.k. 44).

b) Prof. Bojidar LEONOV (BG-4300 Karlovo, p.k. 44 [leonov<at>rozabg.com](mailto:leonov@rozabg.com)).

c) Esperanto estas deviga studlingvo en la programo de la studado; s.240 h. La studado povas esti rete aŭ ĉeeste.

Bazaj studfakoj kaj fakoj por specialiĝo estas turismiko.ekonomiko kaj gvidado de turismaj firmaoj, eŭrologio, komerco, ĵurnalistiko, administrado, librotenado, informadiko. Kromaj studadfakoj kaj fakoj port specialiĝo estas : komputila tekniko, internacia patenta juro, scienc-teknika informado, turisma animacio, organizado kaj gvidado de hoteloj kaj restoracioj, ekskursgvidado. En la studprogramo estas apartaj kursoj pri interlingvistiko, historio de E-movado, E-literaturo kaj kulturo.

La studentoj partoprenas diversajn studadsesiojn de AIS en Bulgario kaj eksterlande.

Post la sukcesa fino de la studado, la studentoj ricevas AIS- Diplomon por Bakalaŭro kaj Magistro.

Krom tio, surbaze de ŝtata licenco de la Nacia Agentejo por profesia edukado, la studentoj povus aldone ricevi ŝtate agnoskitajn dokumentojn por la 10 profesioj menciitaj supre.

## Ĉekio

### **Brno (\*) :**

a) Universitato de Masaryk , Filozofia Fakultato, Instituto pri lingvistiko kaj baltistiko (Arna Nováka 1/1, 602 00 Brno).

b) S-ro Josef VOJÁČEK ( [jvojesp<at>gmail.com](mailto:jvojesp@gmail.com) ).

c) Dum 13 semajnoj, 2 h/sem.

- Esperanto-kurso; kun 4 kreditunuoj; en printempa kaj en aŭtuna semestro.

- Enkonduko en interlingvistikon; kun 3 kreditunuoj; nur en aŭtuna semestro.

Ambaŭ studobjektoj estas elekteblaj kaj finas per kolokvo.

## Ĉinio

### **Baotou (Interna Mongolio) (\*) :**

a) Scienca kaj Teknika Universitato de Interna Mongolio / Neimengu Keji Daxue (Baotou-shi Aerding Dajie 7-hao, Baotou, CN-014010, Baotou, Neimenggu).

- b) S-ro LIU Baoguo ([verdakoro@163.com](mailto:verdakoro@163.com)) – S-ro MA Jianming.
- c) Nedevisa; 4 h/sem; s. 32 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

**Beijing (°) :**

- a) Pekina Lingva kaj Kultura Universitato / Beijing Yuyan Daxue (Xueyuan Lu 15, Haidian Qu, Beijing CN-100083 ).
- b) Prof. LI Weilun (19 Lou 1 Men 102 Hao, Beijing Yuyan Daxue, Haidian Qu, Beijing CN-100083).
- c) Nedevisa; 3 h/sem; s. 30 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

**Beijing (°) :**

- a) Pekina Pedagogia Universitato / Beijing Shifan Daxue (Xinjiekouwai Dajie 19, Haidian Qu, Beijing CN-100875)
- b) Prof. ZHOU Liuxi ([zhouliuqi@aliyun.com](mailto:zhouliuqi@aliyun.com))
- c) Nedevisa; 2 h/sem; s. 30 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

**Changzhou (Jiangsu) (°) :**

- a) Jiangsu-a Teknika Universitato / Jiangsu Ligong Xueyuan (1801 Zhongwu Dadao, Changzho, CN-213001, Jiangsu).
- b) S-ro ZHANG Changiang ( [21406698@qq.com](mailto:21406698@qq.com) ) ; S-ro PAN Yajiang ( [cina\\_e\\_pan@126.com](mailto:cina_e_pan@126.com) ) /P/.
- c) Nedevisa; 4 h/sem; s. 60 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj. Sen atestilo.

**Changzhou (Jiangsu) (°) :**

- a) Changzhou-a Liuguojun Profesia kaj Teknika Kolegio Changzhou Liuguojun Gaodeng Zhiye Jishu Xuexiao (296 Fuminglu, Changzhou CN-213025, Jiangsu).
- b) S-ro HO Song ( [hosong53@hanmail.net](mailto:hosong53@hanmail.net) ) ; S-ro ZHANG Changjiang ( [21406698@qq.com](mailto:21406698@qq.com) ) /P/
- c) Nedevisa; 2 h/sem, s. 36 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj. Sen atestilo.

**Changzhou (Jiangsu) (°) :**

- a) Chanzhou-a Turisma kaj Komerca Kolegio Changzhou Lvyou Shangmao Gaodeng Zhiye Jishu Xuexiao (8 Honghelu, Changzhou CN-213032, Jiangsu).
- b) S-rino GAOYUAN ( [119434753@qq.com](mailto:119434753@qq.com) ) ; S-ro WU Jiangdong ( [2417127010@qq.com](mailto:2417127010@qq.com) ).
- c) Nedevisa; 2 h/sem, s. 36 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj. Sen atestilo.

**Changzhou (Jiangsu) (\*) :**

- a) Changzhou-a Informa kaj Teknika Kolegio / Changzhou Xinxi Jishu Xueyuan (22 Mingxin Zhonglu, Changzhou CN-213164, Jiangsu).
- b) S-rino CHENYE ( [545085417@qq.com](mailto:545085417@qq.com) ) ; S-ro ZHANG Changsheng ( [bankisto@126.com](mailto:bankisto@126.com) ) / P/
- c) Nedevisa; 3 h/sem, s. 54 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj. Sen atestilo.

**Changzhou (Jiangsu) (\*) :**

- a) Changzhou-a Teknika Kolegio / Changzhou Gongcheng Xueyuan (3 Gehu Zhonglu, Changzhou CN-213164, Jiangsu.
- b) S-ro ZHANG Changsheng ([bankisto@126.com](mailto:bankisto@126.com) ).
- c) Nedevisa; 3 h/sem, s. 54 h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj. Sen atestilo.

**Nangchang (°) :**

- a) Jiangxi Polica Universitato.
- b) S-ro ZHANG Xuesu ( [xs535@163.com](mailto:xs535@163.com) ) /P/
- c) Nedevisa. Kun ekzameno kaj 2 poentoj.

**Nanjing (Jiangsu) (\*) :**

- a) Nanjing Universitato / Nanjing Daxue (Hankou Lu 22 Hao, Nanjing-si, Jiangsu CN-2100093).
- b) S-rino CUI Jianhua ( [cuijh2@nju.edu.cn](mailto:cuijh2@nju.edu.cn) ).
- c) Nedevisa. 4h/sem, s. 64 h. Kun ekzameno kaj 2 poentoj.

**Shenyang (Liaoning) (°) :**

- a) Liaoning Universitato / Liaoning Daxue (Shenyang-shi Chongshanzhonglu-66hao, Huanggu-qu, Shenyang, CN-110036, Liaoning).
- b) Prof. LI Yanhong (Shenyang-shi Chongshanzhonglu, 66hao, Huanggu-qu, Shenyang, CN-110036, Liaoning) /P/.
- c) Nedevisa. 4 h/sem, s. 60h. Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

**Xuzhou (Jiangsu) (\*) :**

- a) Normala Universitato de Jiangsu / Jiangsu Shifan Daxue (Shanghai 101, Tongshan Qu, Xuzhou, CN-221116).
- b) S-ro WANG Xiaohong ( [82449230@qq.com](mailto:82449230@qq.com) ) ; S-ro WANG Xiaotie ( [376834064@qq.com](mailto:376834064@qq.com) ) /P/
- c) Nedevisa; 6 h/sem. Kun ekzameno kaj 4 poentoj.

**Zaozhuang (Shandong) (\*) :**

- a) Zaozhuang-a Universitato ( Zaozhuang Xueyuan Guoji Xueyuan, CN-277100 Shandong).
- b) Doc. SUN Mingxiao ( [semio@163.com](mailto:semio@163.com) ) - Prof. SASAKI Teruhiro ( [steruhiro31@gmail.com](mailto:steruhiro31@gmail.com) ) /P/ - S-ro HOIKSO ( [dongfangxin56@126.com](mailto:dongfangxin56@126.com) ) /P/.
- c) Nedevisa, por studentoj el diversaj fakultatoj; dum la unua semestro; sume 36 h. Kun 2 poentoj post sukcesa ekzameno.

( Landaj informantoj (°) : S-ro WU Guojiang ([ghemelurboj@sina.cn](mailto:ghemelurboj@sina.cn))  
Prof. D-ro GONG Xiaofeng ([arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com)) )

## Francio

### **Lannion (\*)**

**a)** Nacia Altlernejo pri Sciencoj / Ecole Nationale Supérieure des Sciences Appliquées et de Technologie ENSSAT (6, rue de Kerampont, FR-22305 Lannion Cedex). Inĝeniera nivelo (Bakalaŭro+5)

**b)** S-ino Françoise MERIAUX (Maja en Esperantujo - Koad-Merrien, FR- 22140 BEGARD [meriaux.family<at>wanadoo.fr](mailto:meriaux.family@wanadoo.fr) ).

La kursgvidantino estas pagata de la Universitato de RENNES 1.

**c)** 2 h/sem dum 2 semestroj (=60 h). Por studentoj kiuj jam havas bonan nivelon en la angla. Elektbla kiel dua lingvo, inter la germana, la hispana kaj la japana.

Daŭriga taksado, kiu valoras en la kompleta noto.

## Germanio

### **Emden (\*) :**

**a)** Altlernejo / Hochschule Emden-Leer (Constantiaplatz 4, DE-26723 Emden – [www.hs-emden-leer.de](http://www.hs-emden-leer.de) ).

**b)** S-ro Sebastian KIRF (Dodo-Wildvang-Straße 4, DE-26723 Emden – [sebastian.kirf<at>hs-emden-leer.de](mailto:sebastian.kirf@hs-emden-leer.de) - <http://hs.kurso.info> - <http://esperanto-emden.de> ) /P/.

**c)** Elektbla lingvokurso (por plenumi la devigan lingvokurson unusemestran -> 3 studpoentoj) aŭ elektofako (-> 2 studpoentoj) por la studentoj de la Fakultato "Socia laboro kaj saneco". Baza kurso : 15 x 1,5 h/sem. (sume : 22,5 h). Miksitaj lernelementoj, la bazo estas la libro "Esperanto direkt", el kiu estas tralaborata ĉ. la 10-15 unuaj lecionoj.

La kurso okazos parte per hejma komputilo.

Kun skriba finekzameno kaj studpoentoj. Validas por plenumi la necesajn ĝeneralajn studhorojn.

### **Münster (\*) :**

**a)** Universitato, Instituto por Ĝenerala Lingvistiko / Universität Münster, Institut für Allgemeine Sprachwissenschaft (Aegidiistr. 5, DE-48149 Münster).

**b)** D-rino Norma SEITHEL ( [dr.n.seithel<at>seithel.de](mailto:dr.n.seithel@seithel.de) ) - D-ro D-ro Rudolf FISCHER (Gustav-Adolf-Str. 2a, DE-48356 Nordwalde, [fischru<at>uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de)) /P/.

**c)** Dum la vintra semestro; libervola kadre de "Ĝeneralaj Studoj" ; 2 h/sem.

Kun 5 studpoentoj.

## Hispanio

### **La Laguna (Tenerifo, Kanariaj Insuloj) (\*) :**

**a)** Universitato de La Laguna, Departemento de angla kaj germana filologio

<http://www.ull.es> (Universidad de La Laguna, Departamento de Filología Inglesa y Alemana, Campus de Guajara, ES-38071 La Laguna).

**b)** Prof. Alejandro LOPEZ DE VERGARA M ([aflopez@ull.es](mailto:aflopez@ull.es) -

<http://webpages.ull.es/users/aflopez/esp/index.htm>)

**c)** Libervola seminario por la universitata komunumo ĉe la Fakulato pri Filologio :

« Enkonduka Seminario pri Esperanto kaj ĝia kulturo » (Seminario de Introducción al Esperanto y su Cultura) ; sume 30 h. La Esperantista Societo de Tenerifo, kutime ankaŭ

kunlaboras per kvar prelegantoj dum la kurso - <http://webpages.ull.es/users/aflopez/esperanto/>

Kun 3 kreditunuoj.

## Hungario

### **Nyíregyháza (\*) :**

**a)** Atlerneja Lingvolernejo « Students Stop ! » (HU-4400 Nyíregyháza, Sóstói u.31/B).

**b)** S-ino Enikő ZENGŐ SEREGHY (HU-4400 Nyíregyháza, Dózsa Gy. u-14.2/8 - [enimyster@gmail.com](mailto:enimyster@gmail.com) ).

**c)** Trimonata kurso, dufoje 4 lecionoj semajne ; sume 100 h. Post la fino de la kurso la studentoj decidis laŭ mia propono, ĉu ekzameniĝos pri la lingvo, aŭ ili plu lernas dum ĉ. unu monato.

La gestudentoj faras ekzamenon, por ricevi siajn diplomojn en la Altlernejo. Ili faras ŝtatan lingvoekzamenon en meznivelo en pli granda procento.

## Italio

### **Torino (\*) :**

**a)** Universitato de Torino, StudiUm - Departemento de Humanistikaj Studoj. Lecionoj ĉe "Palazzo Nuovo" (Via Sant'Ottavio 20, Torino).

**b)** D-ro Federico GOBBO ([federico.gobbo@unito.it](mailto:federico.gobbo@unito.it) ).

**c)** "Lingvoplanado kaj planlingvoj". Nedeviga, malfermita al magistras studentoj de lingvistiko, filozofio, historio, literaturo, komparaj kulturoj. Malfermita en la akademia jaro 2011-12, la kurso estas entute 36-hora (6 h/sem) : ĉiun lecionon la unuaj du horoj pri interlingvistiko, eŭropa lingvo-politiko kaj lingvo-planado; la tria pri Esperanto.

Kun ekzameno kaj kun 6 kreditunuoj.

Oficiala retejo: [http://linguistica.campusnet.unito.it/do/corsi.pl/Show?\\_id=xn6g](http://linguistica.campusnet.unito.it/do/corsi.pl/Show?_id=xn6g)



## Japanio

### **Minoo (Osaka-hu) (\*) :**

**a)** Osaka Universitato, Fremdlingva Fakultato / Osaka Daigaku, Gaikokugogakubu (Aomatani-Higasi 8-1-1, JP-561-8558 Minoo).

**b)** S-ro TANI Hiroyuki (Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561-0831 Toyonaka; [tnhryk@pop07.odn.ne.jp](mailto:tnhryk@pop07.odn.ne.jp)) /P/.

**c)** Nedevisa, unujara lingvokurso, 1 ½ h/sem., s. 45 horoj jare.  
Kun ekzameno kaj studunuoj.

### **Tôkyô (\*) :**

**a)** Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj / Tokyo Gaikokugo Daigaku (3-11-1, Asahi-cho, Fuchu-shi, Tôkyô, JP-183-8534).

**b)** Prof. GOTOO Hitosi ([gothit@sal.tohoku.ac.jp](mailto:gothit@sal.tohoku.ac.jp) ;  
[URL:http://www.sal.tohoku.ac.jp/~gothit/](http://www.sal.tohoku.ac.jp/~gothit/)) /P/.

**c)** Nedevisa, duonjara; intensiva kurso dum semajno; s. 30 horoj.  
Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

### **Fukuoka (°) :**

**a)** Kyushu-Universitato/Kyushu Daigaku (Hakozaki 6-10-1, Higasi-ku, Fukuoka-si, JP-812-8581).

**b)** Prof. TABATA Yoshiyuki ([tabata@cc.kyushu-u.ac.jp](mailto:tabata@cc.kyushu-u.ac.jp) ).

**c)** Nedevisa, somera intensiva lingvokurso; s. 22 horoj.  
Kun 2 studunuoj.

( Landa informanto (°) : ISIKAWA Tiekô [isksanjo@ff.e-mansion.com](mailto:isksanjo@ff.e-mansion.com) )

## Korea Resp.

### **Iksan (\*) :**

**a)** Universitato Wonkwang, (344-2 Shinyong-dong, Iksan, Chonbuk, KR-570-749  
<http://www.wonkwang.ac.kr> ).

**b)** Doc. LEE Jung-kee ([esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net) ) /P/.

**c)** Libere elektebla; 2 h/sem. dum 16 semajnoj.  
Kun 2 poentoj semestre, kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

### **Jukjeon/Chonan (\*) :**

**a)** Universitato Dankook (448-701 Jukjeon-dong, Yongin-si, Kyungki-do  
<http://www.dankook.ac.kr> ).

Unu klaso en Jukjeon kaj unu klaso en Chonan.

**b)** Doc. MA Young-tae en la urbo Yongin ([mayoungtae@gmail.com](mailto:mayoungtae@gmail.com) ) /P/.

**c)** Libere elektebla; 2 h/sem dum 15 semajnoj.  
Kun 2 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

### **Seoul / Yongin (\*) :**

**a)** Universitato Korea Fremdlingva ( 270 Imun-dong, Dongdaemun-gu, Seoul, kaj Yongin po unu klaso).

**b)** Prof. LEE Young-koo por kurso en Seoul kaj Yongin ( [ykli<at>hufs.ac.kr](mailto:ykli@hufs.ac.kr) ) /P/.

**c)** Libere elektebla; 2 h/sem dum 16 semajnoj.

Kun 2 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

### **Seoul / Suwon (\*) :**

**a)** Universitato Kyunghhee ( 26 Kyunghheedaero, Dongdaemun-gu, Seoul, 130-701 Korea kaj 1732 Deogyong-daero, Giheung-gu, Yongin-si, Gyeonggi-do 446-701, Korea, po unu klaso).

**b)** Doc. LEE Jung-kee en Seoul kaj Suwon ( [esperanto<at>saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net) ) /P/.

**c)** Libere elektebla; 3 h/sem dum 16 semajnoj

Kun 3 poentoj semestre; kaj atestilo nome de Korea Esperanto-Asocio.

## **Kroatio**

### **Zagreb (\*) :**

**a)** Germana fako, Filozofia fakultato, Universitato de Zagrebo / Odsjek za njemački jezik, Filozofski fakultet Sveučilišta u Zagrebu (Ivana Lučića 3, HR-10000 Zagreb)

**b)** D-ro Velimir PIŠKOREC, orda profesoro (Palmoćeva 29a, HR-10000 Zagreb; [vpiskor<at>ffzg.hr](mailto:vpiskor@ffzg.hr))

**c)** 1. Planlingvoj, vintra semestro; 2 instruhoroj (2x45 min.) semajne. Studentoj de la germana lingvo kaj literaturo; instrulingvoj: la germana kaj la kroata. Enhavo: historio de planlingvoj, bazaj nocioj kaj teorioj de interlingvistiko, Esperanto-kurso por komencantoj laŭ la Zagreba metodo. Kun 2 kreditunuoj.

2. Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto; somera semestro; 2 instruhoroj (2x45 min.) semajne. Studentoj de la Filozofia fakultato; instrulingvo: la kroata. Enhavo: historio de planlingvoj, bazaj nocioj kaj teorioj de interlingvistiko, Esperanto-kurso por komencantoj laŭ la Zagreba metodo. Kun 3 kreditunuoj.

## **Litovio**

### **Šiauliai (\*) :**

**a)** Šiauliai Universitato (str Vilniaus 88, LT-76285 Šiauliai).

**1) :**

**b)** Prof. Aloyzas GUDAVIČIUS (Žeimių 2a-12, Ginkūnai, Šiaulių raj; [gudaviciush<at>u.su.lt](mailto:gudaviciush@u.su.lt)).

**c)** Interlingvistika kurso, elektebla por filologoj de magistras studoj; 2 h/sem, s. 32 h; dum semestro.

Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

2) :

b) S-ro Zenonas SABALYS (Dvaro 111, LT-76210 Šiauliai [zenonas.sabalys<at>takas.lt](mailto:zenonas.sabalys@takas.lt) ).

c) Elektbla Esperanto-kurso; dum 1 semestro; 2 h/sem. s. 32 h.

Kun ekzameno kaj 2 studunuoj.

## Meksiko

**México (\*) :**

a) Universitato Nacia Aŭtonoma de Méxiko (UNAM ( [www.unam.mx](http://www.unam.mx) ), Fakultato pri Juro ( [www.derecho.mx](http://www.derecho.mx) ) / Universidad Nacional Autónoma de México, Facultad de Derecho UNAM

b) Doktoranto Luis CÓRDOVA ARELLANO ( [luisesperanto<at>yahoo.com](mailto:luisesperanto@yahoo.com) ).

c) Sabate, 3 h, 6 kurssesioj.

Informo ĉe : [www.cordovaluis.org](http://www.cordovaluis.org) kaj [www.esperanto-mexico.org](http://www.esperanto-mexico.org)

**Tijuana (\*) :**

a) Universitato / Universidad Autónoma de Baja California, UABC (Calzada Universidad 14418, Parque Industrial Internacional Tijuana, C.P. 22390 B.C., Méxiko).

b) S-rino Gilda MUÑOZ BONILLA ( [gildamunoz<at>live.com](mailto:gildamunoz@live.com) ).

c) Elektbla kurso por studentoj de la Fakultato pri lingvoj por tradukado kaj lingvo-instruado. Baza, inter A1 kaj A2 ; 4 h/sem. ; sume 68 h.

Kun ekzameno kaj kreditunuoj.

## Nederlando

**Amsterdam (\*) :**

a) Universitato / Universiteit van Amsterdam (Theoretische Taalwetenschap, Spuistraat 210, NL-1012 VT Amsterdam).

b) - 1) Unua semestro, kurso pri la lingvo Esperanto : D-ro Wim JANSEN (Emmaplein 17A, NL-2225 BK Katwijk [wimjansen<at>casema.nl](mailto:wimjansen@casema.nl) ; hejme) kaj [w.h.jansen<at>uva.nl](mailto:w.h.jansen@uva.nl) (en la universitato). /P de eksteruniversitata fondaĵo/.

- 2) Dua semestro, interlingvistiko : D-ro Federico GOBBO (Giannone 6, IT-20154 Milano [federico.gobbo<at>gmail.com](mailto:federico.gobbo@gmail.com): hejme).

Programo ĉe <http://studiegids.uva.nl/web/uva/sgs/nl/c/13223.html>.

c) Katedro pri “Interlingvistiko kaj Esperanto”. – Du fakoj estas elektblaj por studentoj prefere ĉirkaŭ la bakalaŭra nivelo (tria jaro).

1) Nomo kaj priskribo de la unua fako (funkcianta de 2002) : “interlingvistiko”, kiu donas ĝeneralan komprenon pri la internacia lingvoproblemo kaj pri planlingvaj solvopropoj en ilia historia, sociologia kaj lingvistika kunteksto. Ĝi estas studata el pluraj perspektivoj.

Krome, estas pristudataj pli profunde kelkaj modernaj lingvomodeloj. Pri la ekzempla lingvo Esperanto estas konsiderataj aspektoj kiel la tipologio, la funkciado, natureco kontraŭ skemeco, spontanaj evoluoj, literaturo, k.s.

Dum 3 monatoj, 3 h/sem. (s. 42 h, lekcioj).

La fina prijuĝo kun poentaro inter 1 (malbona) kaj 10 (perfekta) okazas surbaze de la averaĝa prijuĝo de la hejmtaskoj kaj la ekzamena rezulto. La kredito estas 10-punkta laŭ la Eŭropa ECTS-sistemo.

2) Nomo kaj priskribo de la dua fako (funkcianta de 2006): “Esperanto”, kiu donas lingvokursojn kovrantan la bazajn gramatikon kaj leksikon de la lingvo. Krome estas studataj kelkaj specifaj trajtoj de la Esperanto-gramatiko el ĝenerallingvistika vidpunkto.

Dum 3 monatoj, 3 h/sem. (s. 42 h, lekcioj).

La fina prijuĝo kun poentaro inter 1 (malbona) kaj 10 (perfekta) okazas surbaze de la averaĝa prijuĝo de kvar laŭsemestraj ekzamenoj. La kredito estas 10-punkta laŭ la Eŭropa ECTS-sistemo.

La fakultato rekonas la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto kiel oficialan stagejon por studento(j). Ĉiujare studentoj estas invitataj konkurse prezenti esplortemon, kies venkanta aŭtoro(j) gajnas unusemajnan staĝon dum la UK financatan de eksteruniversitataj fontoj privataj kaj instituciaj. Aprobata esplorraporto donas krediton de (po) 5 poentoj al la studento(j).

## Nikaragvo

### **Managua (\*)**

a) Universidad Nacional Autónoma de Nicaragua (Rotonda universitaria 500mts al sur).

b) S-ro Uriel GURDIÁN MÉNDEZ ( [info<at>esperanto-nicaragua.org](mailto:info@esperanto-nicaragua.org) ).

c) Libere elektebla; 4 h/sem dum 20 semajnoj, s. 80 horoj; 2-foje jare.

Kun atestilo pri partopreno nome de la universitato (UNAN) kaj Esperanto Internacia.

## Pollando

### **Kraków (\*) :**

a) Jagelona Universitato (ul. Gołębia 24, PL- Kraków).

b) Mag-ino Maria MAJERCZAK (Kraków, [mmajerczak<at>gmail.com](mailto:mmajerczak@gmail.com) ) /P/.

c) 1- Mezgrada E-kurso (B2). En la vintra semestro, 30 h; 2 h/sem. Elektebla.

Kun skriba kaj parola KER-ekzameno (oficiale kaj rigore, ĉiuj lingvaj ekzamenoj en la universitato estas ang. CEFR / esp. KER-ekzamenoj ). Kun "Certyfikat" (atestilo) de la Jagelona Universitato pri Esperanto.

Studentoj de la universitato povas elekti E-on kiel devigan studobjekton kun ekzameno, pritakso, ECTS-poentoj, konfirmo en la studlibreto kaj en la oficiala ekzamena registro.

c) 2- "Kreado de tekstoj en Esperanto" - Oficiala kategorio: speciala kurso, laŭtema.

Nivejoj: C1, C2 ; 60 h., 3 h/sem. Internacia kurso, elektebla. Sen ekzameno, kun oficiala konfirmilo de la universitato pri partopreno.

**c) 3-** "Disvolvado de la skrib- kaj parolkapablo" - Kategorio: speciala kurso.  
Nivelo C1. 60 h., 3 h/sem. Internacia kurso, elektebla. Sen ekzameno, kun oficiala konfirmilo pri partopreno.

**c) 4-** "Lingvaj kaj komunikaj aspektoj de skribado kaj parolado" - Kategorio: speciala kurso.  
Nivejoj: B2, C1. 60 h., 3 h/sem. Internacia kurso, elektebla. Sen ekzameno, kun oficiala konfirmilo pri partopreno.

### Usono

#### **Stanford (Kalifornio) (\*):**

**a)** Universitato Stanford ( PO Box 20089 Stanford, Ca 94309-0089 USA;  
<http://Esperanto.org/stanford> ).


**b)** S-ro E. WILLIGER ( [stanford<at>Esperanto.org](mailto:stanford@Esperanto.org) ).

**c)** Baza kurso; 2 h/sem. ĉe La Internacia Centro de la Universitato, kaj proponita ĉiujtaga hejmtasko.

Oni rajtas akiri studunuojn de la Universitato, sed nur kun ties permeso kaj malfacile.

==+==+==+==+==+==+==

## Disvolviĝo inter 1977 kaj 2014



**Laŭ :** [landoj-kursoj]

G.Pirlot, Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo [poŝta kompilado]

1977 : 1-a eld., dec. 1977 [21-58]

1980 : 2-a eld., jan. 1981 [19-51]

1981 : 3-a eld., jan. 1982 [15-56]

1983 : 4-a eld., dec. 1983 [17-79]

1984 : 5-a eld., dec. 1984 [22-109]

1986 : 6-a eld., jun. 1986 [28-125]

1988 : 7-a eld., jun. 1988 [24-107]

1990 : 8-a eld., jun. 1990 [19-91]

1992 : 9-a eld., jun. 1992 [23-90]

G.Pirlot, Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj [reta kompilado]

2002 : nov. [20-43]

2004 : febr. [23-63]

2006 : jan. [26-75]

2008 : jan. [24-68]

2010 : jan. [21-56]

2012 : jan. [19-50]

2014 : jan. [16-40]



## E-KURSOJ NE OFICIALE ORGANIZATAJ :

### *Interlingvistikaj kaj esperantologiaj kursoj*

#### **Poznan, Pollando (\*) :**

**a)** Universitato Adam Mickiewicz, Instituto pri Lingvistiko (al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).

**b)** Prof. dr hab. Ilona KOUTNY ( [ikoutny<at>amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl) ) ; Mag. Michael FARRIS ( [maf<at>amu.edu.pl](mailto:maf@amu.edu.pl) ).

**c)** **Tutjara ĉiusemajna kurso** (60 horoj) en la angla: "*International communication - International languages*" por la tagaj gestudentoj de la Lingvistika Instituto kun partopreno de eksterlandanoj enkadre de Erasmus-programo.

Temoj : <http://international.amu.edu.pl/amu-pie-short-courses2/amu-pie-short-courses/amu-pie-offer-20132014-winter-semester2/international-communication-international-languages>

\*\*\*\*\*

### *Kompleksa universitata programo*

#### **Poznan, Pollando (\*) :**

**a)** Universitato Adam Mickiewicz, Instituto pri Lingvistiko (al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).

**b)** Gvidanto de la ***Interlingvistikaj Studo j***: Prof. dr hab. Ilona KOUTNY ([ikoutny<at>amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)); prelegantoj en 2013/14: Prof. dr Humphrey TONKIN (nuntempa E-movado, literaturo), D-ino Katalin KOVATS (metodiko), Istvan ERTL (nuntempa E-literaturo), Prof. dr Zbigniew GALOR (sociologiaj aspektoj de komunikado), Prof. dr Ilona KOUTNY (lingvistikaj aspektoj de komunikado, instruado de gramatiko kaj vortprovizo). Krome gastprelegantoj.

**c)** ***3-jara postdiploma universitata studado*** pri interlingvistiko kaj esperantologio por internacia partoprenantaro (ĉi jare la 5-a grupo studas en sia 3-a jaro kun 9 partoprenantoj); unusemajna intensa sesio / semestro kaj reta laboro inter la renkontiĝoj.

Info: <http://www.amu.edu.pl/~inter/>.

\*\*\*\*\*

### *Intruistaj trejnadoj*

#### **Poznan, Pollando (\*) :**

**a)** Universitato Adam Mickiewicz, Instituto pri Lingvistiko (al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).

**b)** Prof. dr hab. Ilona KOUTNY ( [ikoutny<at>amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl) ); gvidanto de la metodika programo: D-rino Katalin KOVATS ( [katalin.kovats<at>gmail.com](mailto:katalin.kovats@gmail.com) ); kursgvidantoj: S-ro Tomasz CHMIELIK kaj la ĉijaraj prelegantoj de la Interlingvistikaj Studoj

c) Unujara instruista trejnado kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net por internacia partoprenantaro (11 partoprenantoj el 8 landoj); unusemajna intensa sesio / semestro kaj reta laboro inter la renkontiĝoj.

\*\*\*\*\*

### **Kursoj sine de universitata asocio**

#### **Antananarivo, Madagaskaro (\*) :**

a) Campus Universitaire d'Ambohitsiana, B.P. 566 MG-101 Antananarivo, Madagaskaro.

b) RABEVAZAHA Désiré ( B.P. 3171, MG-101 Antananarivo – [desire\\_rabevazaha<at>yahoo.fr](mailto:desire_rabevazaha@yahoo.fr) ).

c) Laŭ permeso de la ministerio pri nacia edukado ekde 1995 ĉe beletra fakultato. 4/h/sem, sume : 80 h. Kun dunivela ekzameno kaj diplomo « Atesto pri lernado » kaj « Atesto pri praktika lernado ».

#### **Baotou (Interna Mongolio), Ĉinio (\*) :**

a) Scienca kaj Teknika Universitato de Interna Mongolio / Neimengu Keji Daxue (Baotou-shi Aerding Dajie 7-hao, Baotou, CN-014010, Baotou, Neimenggu).

b) S-ro LIU Baoguo ( [verdakoro<at>163.com](mailto:verdakoro@163.com) ) - S-ino CHEN Ping.

c) Libervola kurso por novaj membroj de la E-societo de la universitato.

#### **Beijing (\*) :**

a) Pekina Lingva kaj Kultura Universitato / Beijing Yuyan Daxue (Xueyuan Lu 15, Haidian Qu, Beijing CN-100083 ).

b) Prof. LI Weilun (19 Lou 1 Men 102 Hao, Beijing Yuyan Daxue, Haidian Qu, Beijing CN-100083).

c) En kunlaboro kun Prof. LI okazas neoficiala daŭriga kurso sub la gvido de s-ro USUI Hiroyuki ([usui\\_hiroyuki<at>hotmail.com](mailto:usui_hiroyuki@hotmail.com)).

#### **Liverpool, Britio (\*) :**

a) Universitato / University of Liverpool (Liverpool, Mersyside L69 3BX, United Kingdom).

b) Diverslandaj kursgvidantoj en 2014(marto 26-28) : E-lingvo : S-ro Hilary CHAPMAN (Britio); E-literaturo en traduko : D-ro Paul GUBBINS (Britio); E-lingvistiko : D-ro Federico GOBBO (Italio).

c) Tritaga kursaro sub egido de la universitata E-fonduso Buchanan kaj Esperanto-Asocio de Britio. Kunordiganto : D-ro Paul GUBBINS ([p.p.gubbins<at>staffs.ac.uk](mailto:p.p.gubbins@staffs.ac.uk)).

#### **Rochester (New-York), Usono (\*) :**

a) Universitato / University of Rochester.

b) S-ro Hoss FIROOZANIA (CPU 271205, University of Rochester, Rochester, NY 14627-1205 - [hoss<at>lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org) ) /P/.

c) 1.5 h/sem., dum 10 semajnoj.



Sennota enkonduko al la lingvo kaj kulturo. Hejmtasko el diversaj fontoj, inkluzive de la anglalingva lernolibro "Teach Yourself Esperanto".

Info : < <http://esperanto.lodestone.org> >.

**Sheffield, Britio (\*) :**

a) Universitato / University of Sheffield - Western Bank (Sheffield, South Yorkshire S10 2TN).

b) Esperanto-Asocio de Britio (S-ro Tim OWEN - [tim.owen@esperanto.org.uk](mailto:tim.owen@esperanto.org.uk) ).

c) Dum semajnfina evento "Internacia Festivalo de Lingvoj", 5 aŭ 6 sesioj, inter 3 aŭ 4 gustumsesioj kaj 2 pliaj prezentaĵoj.

**Victoria (Brita Kolombio), Kanado (\*)**

a) Universitato / University of Victoria.

b) Diverslandaj kursgvidantoj - baza nivelo : S-ino Ĵenja BONDELID (Usono); meza nivelo : S-ro USUI Hiroyuki (Japanio / Ĉinio); supera nivelo : S-ro Istvan ERTL (Hungario / Luksemburgio).

c) Ne-oficialaj kursoj de la universitato. 8 intensivaj tagoj : klasoj matene, eksterklasaj aktivecoj posttagmeze kaj vespere.

Ĉiu studanto ricevos atestilon de NASK ( Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursaro <http://esperanto.org/nask> ).

Kunordiganto : S-ro Ellen M. EDDY (11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 [eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com) ).

**Zaozhuang (Shandong), Ĉinio (°) :**

a) Zaozhuang-a Profesia Instituto.

b) S-ro ZHAO Yaping.

c) Libera kurso, organizata de Studenta Esperanto-Societo en la Instituto.

\*\*\*\*\*

**Universitatoj de la tria aĝo**

Esperanto estas instruata ankaŭ en tiel nomataj "universitatoj por la tria aĝo", ekzemple en :

**Florianópolis (Santa Catarina) Brazilo (\*) :**

a) Centro de Studoj pri la Tria Aĝo (NETI en la portugala) ĉe Federacia Universitato de Sankta Katarino (UFSC).

b) S-ro António Félix DA SILVA ( [antoniofelixdasilva@gmail.com](mailto:antoniofelixdasilva@gmail.com) ).

c) Baza kurso; 30 h/semestre.

**Lille, Francio (\*) :**

a) Universitato pri Libera Tempo, ligita al la Universitatoj de Lille / Université du Temps Libre ĉe ENSAM (Ecole Nationale Supérieure d'Arts et Métiers / Altlernejo por inĝenieroj, 8, boulevard Louis XIV, FR-59046 Lille Cedex).

b) S-ro Michel DECHY (65, allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq - [michel\\_dechy<at>hotmail.com](mailto:michel_dechy@hotmail.com) ).

c) Dunivelaj kursoj ; 10 lecionoj po 1h30, kaj prelego pri Esperanto.

**Nowy Sącz, Pollando (\*) :**

a) Universitato de la Tria Aĝo (MOK, Aleja Wolności 23, PL-33-300 Nowy Sącz ).

b) S-rino Danuta KOWALSKA (ul. Broniewskiego 8 b/7, PL-33-300 Nowy Sącz – [vojdan2<at>rtk.net.pl](mailto:vojdan2@rtk.net.pl) ) - S-rino Jolanta KIERES ( ul. Grodzka 11, PL-33-300 Nowy Sącz – [jola11k<at>interia.pl](mailto:jola11k@interia.pl) ).

c) Tri kursoj; 2 h/sem., s. 60 h. Kun ekzameno kaj atestilo.



**Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)**

[www.ais-sanmarino.org](http://www.ais-sanmarino.org)

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino estas la komuna agadpodio de fakte elstaraj kaj lingvopolitike progresemaj sciencistoj el la tuta mondo, kiuj celas internacilingve pliefikigi la esploron kaj instruon de ĉiuj sciencoj, kaj pliproksimigi ĉi tiujn al la tekniko kaj arto, per plibonigo de la internacia komunikado kaj de la interfaka kunlaborado.

La Membroj (MdAIS), same kiel la asociitaj, efektivaj membroj (AMdAIS) kaj la adjunktoj (AdAIS) apartenas al diversaj nacioj, kontinentoj, rasoj, religioj, lingvoregionoj kaj politikaj kampoj. La politika pluralismo de la apartenataro garantias la striktan politikan neŭtralecon de AIS, krom la komuna strebado al ties precipa politika celo: realigi en la scienca mondo iom post iom la bazan homan rajton je komunikado sen malhelpo ĉu pro lingvobaroj ĉu pro lingvodiskriminacio.

Kvankam la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) laŭ artikolo 4 de sia Konstitucio "zorgas speciale pri la aplikado de la Internacia Lingvo en la scienca komunikado kaj en kulturo", ĝi nek volas nek povas anstataŭi la Akademion de Esperanto aŭ ajnan alian organizon de la Esperanto-movado.

Kvankam la ununura laborlingvo de la Senato, de la Ĝenerala Asembleo kaj de la ekzamenkomisionoj de AIS estas ILo, la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto, la Konstitucio deklaras krome la kvar en la eŭropa scienco plej tradiciĉajn etnajn lingvojn oficialaj lingvoj de AIS: la italan, francan, germanan kaj anglan lingvojn.

Regule AIS organizas diversajn konferencojn, i.a. « Sanmarinecajn Universitatajn Sesiojn » (SUS), dum kiuj okazas studfinaj ekzamenoj je iu ajn nivelo.

Kontaktadreso : [informo<at>ais-sanmarino.org](mailto:informo@ais-sanmarino.org)

## Universitato de Esperanto

La Universitato de Esperanto estas nova projekto por starigi universitat-nivelajn kursojn tute en Esperanto. Ĝi baziĝas sur la modeloj de la programoj angle nomataj OPEN de la Universitato de Berkeley ( [www.webcast.berkeley.edu](http://www.webcast.berkeley.edu) ) kaj de la Universitato de Yale ( [www.oyc.yale.edu](http://www.oyc.yale.edu) ), tiel ke la kursoj estas filmitaj kaj poste senpage disponeblaj ĉe la Interreto. La kursoj estas kompletaj, instruataj de rekonata fakulo kun doktordiplomo kaj universtata instruo-sperto, inter 30- kaj 40-horaj, sufiĉe ĝeneralaj, filmataj kaj registrataj, kutime jam instruataj en aliaj universitatoj, kaj okazas sub la licenco Krea Komunaĵo. Ili iĝos ĉies propraĵo kaj ili ankaŭ disponeblos por la eventuala kaj libera utiligado de AIS.

Post la fino de tiuj du kursoj dum Esperanto-Insulo, nova retejo por la Universitato de Esperanto estis starigita, kaj tie, kiel en la sistemoj de Berkeley kaj de Yale, troviĝas ĉiuj kursomaterialoj por, ke interesataj homoj povos poste studi tiujn kursojn. La retejo troviĝas ĉe <http://www.esperanto.info/> . Estas espereble, ke poste Esperantistoj tra la tuta mondo utiligos sian Esperanton por studi temojn kiuj ne rilatas ne nur al la lingvo Esperanto mem, sed ankaŭ al faktemoj, utilaj kaj interesaj.

Kvankam Esperanto-Insulo en Ĉinio estas la naskiĝloko de la Universitato de Esperanto, tio tute ne signifas, ke ĝi estos la ununura loko de venontaj kursoj. Kursoj povas stariĝi ie ajn, sed ili devas respekti la bazajn principojn de la Universitato de Esperanto. Kursoj, kiuj estas ekster ĝia kadro, certe tamen bonvenos en aliaj strukturoj, aliaj kadroj kiaj tiu de AIS aŭ aliaj. Jam ĉe la retejo <http://www.esperanto.info/> estas tri kompletaj kursoj : *Historio kaj Filozofio de la Informadiko*, de Prof. Federico Gobbo; *Alfronti Milton*, de Prof. Ron Glossop; *Enkonduko al Astronomio kaj Astrofiziko*, de Prof. Amri Wandel.

Dennis KEEFE, Universitato de Nanjing (Jiangsu), Ĉinio



### **Postparolo :**

Kiel kutime kiu ajn rajtas uzi ĝin laŭplaĉe, kondiĉe menciigi la fonton.  
Krome, kiel mi faris ĝis nun, mi diskonigos sciigojn pri aliaj kursoj, kiujn mi ricevos post la dissendo de ĉi-tiu listo.

Esperante ke ĝi povos iel helpi ... kaj ke ne estas en ĝi tro da tajperaroj !!!

Kore kaj kolege via,

G. P.

=++++=++++=++++=

### **23.11.2014 - Zaozhuang, Ĉinio**

Nun mi ne plu instruas Esperanton en Interna Mongolio. Mi instruas Esperanton en Zaozhuang, Shandong-provinco. Mi sendis informojn al EL POPOLA ĈINIO pri mia instruado en nova laborejo.

Jen estas la adresoj:

[http://www.espero.com.cn/2014-10/15/content\\_33772971.htm](http://www.espero.com.cn/2014-10/15/content_33772971.htm)

[http://esperanto.china.org.cn/2014-10/17/content\\_33792303.htm](http://esperanto.china.org.cn/2014-10/17/content_33792303.htm)

LIU Baoguo

=====

### **20.11.2014 - Moskva, Rusio**

Ni ĝojas informi, ke la 14-an de novembro 2014 en Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) dum kunsido de Scienca Konsilio estis akceptitaj du studprogramoj por Esperanto-instruado.

La 19-an de novembro laŭ la specialaj ordoj ili estis oficiale validigitaj. Ĉar RUDN estas ŝtata universitato de federala nivelo kun rajto de memdifino de la studprogramoj, tiuj ĉi programoj iĝis aŭtomate tutrusiaj kaj atestiloj de la sukcesintoj estas agnoskataj tra la tuta Rusio kaj en dekoj da landoj, kiuj havas specialajn edukadajn kontraktojn kaj interkonstentojn kun Rusio.

La unua studprogramo nomiĝas "Baza kurso de Esperanto" kaj celas studentojn kaj homojn, kiuj jam havas universitatan kleron. Fininte tiun kurson la lernantoj rajtas ricevi ŝtatan atestilon pri aldonaj profesiaj konoj.

La dua studprogramo celas lernejanon de la lastaj studjaroj kaj ajnajn aliajn homojn sen universitata diplomo. Ĝiaj finintoj ankaŭ ricevas specialan atestilon. Ĉi semajne la unuaj du grupoj de lernantoj komencis lerni Esperanton laŭ tiuj ĉi programoj en RUDN.

Tiujn kursojn antaŭis senpaga 5-leciona "fulmo-kurso", kiun sume partoprenis pli ol 30 personoj en 3 grupoj. La finintoj ricevis honorajn diplomojn kun subskribo de la dekanato de filologia fakultato. Eldonejo Impeto donacis por la kurso libretojn kun Esperanto-gramatiko, kiuj estis senpage disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj de la kurseto.

Dima Ŝevĉenko

=====